

Тарас Шевченко,

Pensoj miaj, pensoj miaj

tradukita de Konstantin Gusev

Pensoj miaj, pensoj miaj,
Ve kun tiaj, vere!
Kial vi en sombraj vicoj
Staras surpapere?
Kiel vento vin ne blovis
Polve en la stepon,
Ne fordormis la malĝojo
Kiel panjo bebon?

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

...

Pensoj miaj, pensoj miaj,
Filoj, floroj lastaj,
Mi vin gardis, mi vin vartis
En la kampoj vataj.
Iru, filoj miaj, hejmen
Al Ukrainio,
Sed mi orfe en fremdujo
Velkos je nenio.
Hejme trovos vi amikajn
Vortojn, bonan koron,
Tie fine trovos veron
Kaj eĉ, eble, gloron ...

Do, karesu, mia kara
Tero Ukraina,
Miajn filojn senprudentajn
Per la man' patrina!

Traduko de la ukraina poeto "Думи мої, думи мої" de Тарас Шевченко en Esperanton de KONSTANTIN GUSEV (†1980-11-09).

Arg-1116-2259 (2015-01-24 23:20:30)

Vidu ankaŭ: <http://homes.chass.utoronto.ca/~tarn/courses/468/Dumy-moi-comparison.pdf>. La melodio estas aŭdebla en <https://www.youtube.com/watch?v=NYECX8BR6nQ>.